

N. N. 32,

Elkreskis
branĉeto*tradukita de Joachim Gießner*

1. Elkreskis rozbranĉeto
el rozarbust' de Di'.
Aŭguro de profeto
rakontis jam pri ĝi.
Naskiĝis rozfloreto
meze en vintra nokto
laŭ diro de profet'.

2. Ja naskis tiu rozo -
Jesaj' prognozis ĝin -
el sia korpo sproson
Mari' la virgulin'.
Laŭ dipotenca vol'
ŝi naskis Di-infanon
por tuta mond' konsol'.

3. Kaj tiu belfloreto
tre hele lumas ĝi.
Obskuron la brileto
forprenas nun de ni.
Vi hom' kaj vera Di'
el pekoj kaj suferoj
estas savant' por ni.

...

N. N. 32,

roz- En rose så jeg skyde

tradukita de Thomas Laub

En rose så jeg skyde
op af den frosne jord,
alt som os fordum spåde
profetens trøsteord.
Den rose spired frem
midt i den kolde vinter
om nat ved Bethlehem.

For rosen nu jeg kvæder
omkap med Himlens hær:
en jomfru var hans moder,
Maria ren og skær.
I ham brød lyset frem
midt i den mørke vinter
om nat ved Bethlehem.

Den rose fin og lille
har dejlig duft og skær,
den lyse for os ville
og sprede mørket her.
I sandhed mand og Gud,
af syndens nød og pine
han nådig hjalp os ud.

...

N. N. 32,

Rozbranĉo
forĝermadis*tradukita de Felix Ney*

Rozbranĉo forĝermadis
el trunk' de nobelec'.
Prauloj jam kantadis:
de Jiŝaj ĝia spec'.
Floreton portis ĝi,
en akra vintro estis,
Je horo de noktmez'.

La branĉo anoncita
Jesaja de profet':
Maria netuŝita,
de kiu la floreto'.
Eterne volis Di':
naskinta infaneton
Plej pura restis ŝi.

De tiu eta floro
alvenas bonodor'
Ĝi brilas en la koro,
mallumon pelas for.
Homido, Dia Vort',
nin el sufero helpas,
De pek' Savant' kaj mort'.

...

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).

Arg-618-1244 (2012-10-18 21:24:22)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html>. sub <http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en la Danan de Thomas Laub.

Arg-618-1249 (2012-10-19 19:29:42)

Tiu ĉi danigo de la kanto troviĝas en <http://ingeb.org/spiritua/esistein.html>. Vidu ankaŭ: http://da.wikisource.org/wiki/En_rose_s%C3%A5_jeg_skydekaj http://www.ugle.dk/en_rose_saa_jeg_skyde.html. Pri Thomas Laub vidu la retejn http://de.wikipedia.org/wiki/Thomas_Laub.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de Felix Ney.

Arg-618-1246 (2012-10-18 22:27:59)

Tiu ĉi Esperantigo troviĝas en la retejo <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/r/rozbrancæ1.html>.